La dimanĉa aperitivo konsistis en gustumado de 16 (dek-ses!) diversaj specoj de germanaj vinoj, majstre priskribataj de Anton Kiefer. Sed okazis, kio devis okazi: anstataŭ ol reverŝi la glasfundaĵon en specialajn grandajn glasojn, ŝajnas, ke la gustumantoj frandis, frandis... kaj malpli aŭskultis!

Tamen la prezidanto sukcesis danki al ĉiuj, kaj al la esperantistoj, kaj al la reprezentantoj de la turismaj instancoj de HETTANGE-GRANDE kaj de THIONVILLE, sinjoroj SEIGNERT, LEGAC kaj PIQUEE. Meritita danko, ĉar ili pagis por ni la salonon. Ĉio finiĝis per foto antaŭ la TAKE-budo muntita de la ĉefredaktoro de "La DOMO".

Post la tagmanĝo -kvazaŭ servina!!!- eblis pluviziti la geologian ekspozicion sperte komentita de sinjorino HANZO, profesorino ĉe la Universitato de NANCY; ŝi eĉ kapablis paroligi la ŝtonojn! "Ĝis-is" la partoprenintoj. Enpakis la librojn de la libro-servo familioj THIBIAS kaj COLNOT, malmuntis la budon la prezidanto. Rajtis je ripozo Catherine GALLEGO, al kiu ni ĉiuj danku pro sia sukcesa laboro!

Ĝis la venonta staĝo, la 22/23ajn de oktobro en HAGUENAU. Vin atentos tie Odette SCHEIDEL kaj kantos de vi jam konata ĉarmkantisto...!

La raportanto



ANEKNOTE KAJ ESPERIGE! Dum la manĝo, profesoro DUDICH rakontis, ke ĉe UNESKO li vivis "anglalingve" dum 80% de la deĵorado. En sia pariza hejmo li vivis "france".

La internacie uzatan anglan lingvon li komparis kun dinosaŭro, aldonante: "Vi ja scias, kio okazis al dinosaŭroj!..."

Ni danku al la Strasburga Grupo, kiu tra Sro AUNIS, helpis finance por partoprenado de junaj staĝanoj al la evento.

=====

SEKVU MIN AL LA LANDOJ DE INTERNACIA AMIKECO!...

Aŭguste mi vizitis miajn letergeamikojn en Ĉeĥio kaj Ruslando. Plie mi haltis ĉe la gastigantoj el "Pasport-Servo" kaj el "Amikeca Reto" en Moskvo kaj Sankt-Peterburgo.

La ambasado de Rusio en Luksemburgo petis de mi invitilon por fari enirvizon. En Ĉeĥio vizo ne estas postulata, nur pasporto necesas. Do tiun invitilon mi petis de Ruslanda Esperanto-Asocio kaj ĝin

mi ricevis poste por la ambasado. ankaŭ mi petis, pere de oficistino de mia laborejo, fervojistajn internaciajn permesojn por fervojisto celante traveturadon de Germanio, Ĉeĥio kaj Pollando trajne. Sed mi devis aĉeti bileton por Belorusio kaj Rusio.

Mi ekforiris sole la lan de oktobro vespere. Be-daŭrinde mia edzino ne povis akompani min, ĉar ŝi suferis pro lumbalgio. Ŝi preferis viziti la masa-

ĝiston kaj la kuraciston... Mi veturis 12 horojn al Plzeň (Ĉeĥio) tra Metz, Saarbrücken, Frankfurto, Nurembergo.

La 2an, matene, mia leteramiko de Starý Plzenec atendis min kun sia patro en la stacidomo de Plzeň. Ĉi-tie, en vojaĝoficejo, mi rezervis lokon en vagonlito al Moskvo. La oficistino informis, ke ŝi ne povas vendi bileton de la landlimo ĝis Moskvo. Nur ŝi disponigas bileton kaj rezervadon por vagonlito de Prago ĝis Moskvo... Rusan bileton mi devos aĉeti ĉe kusvagono-respondanto. Do nur rezervadon mi aĉetis ĉi-tie. Ankaŭ telegramon en E° mi sendis al moskva gastiganto por konfirmi mian alvenon. Tri tagojn mirestis ĉe mia amiko. Aŭtomobile mi vizitis lian regionon (Plzeň, Rokycany, Přebíram, Rožmítal, Blatná, Nepomuk), belajn monaĥejojn kaj kastelojn. Ĉi-tie la pejzaĝo estas simila al la "nia": verda kaj malebena. Unufoje mi banis min en la rivero apud la domo de mia amiko. Mia restado estis agrabla pro la afableco de miaj gastigantoj. Posttagmeze, la 4an de aŭgusto, mi forveturis al Moskvo tra Prago, Wrocław, Varsovio, Brest, Minsko kaj Smolensk.

Estis varme, kaj multaj Ĉeĥanoj baniĝis en riveroj. Ilin mi enviis! Dum 37 horoj mi restadis en rusa "ŝvitbaneja" vagonlito kun simpatiaj homoj. La viroj demetis la ĉemizon sed ne la virinoj! Tra la fenestroj mi vidis la monotonajn ebenaĵojn de Pollando kaj Belorusio. Dum longa tempo oni haltis en Brest (Belorusio), por ke la doganistoj kontrolu pasportojn kaj vizojn. La fervojistoj ankaŭ

ŝanĝis la boĝiojn de la vagonoj en levadejo, ĉar la trakoj estas pli larĝaj en eks-Sovetio! Dum tiu halto mi petis trajnbileton Brest-Moskvo al la rusa deĵoranto de la vagonlito. Mi nepre pagis 10 dolarojn. Mi opinias, ke li enpoŝigis mian monon sed ne la fervoja kompanio, ĉar trajnbileton mi ne ricevis! oni diris al mi, ke li estas ankaŭ kontrolisto en tiu vagono. De tiam mi estis trankvila!

Matene de la 6a de aŭgusto, la peranto de SAT en Rusio akceptis min en la stacidomo Belorusskaja. Dum mia tritaga restado mi vizitis Kremlin, katedralojn, bazilikon Bazilo la Beatulo (Sobor Vassilija Blazhenovo), magazenen Goum, Lenin-maŭzoleon, Lenin-muzeon, lomonosov-universitaton kaj Lenin-monton. La belegajn kupolojn de la ortodoksaj katedraloj mi tre ŝatis. Mi miris pro la beleco de la stacioj de la subtrajno. Mia amiko montris al mi la domon, kie loĝis Zamenhof, kaj la teatron Bolĉoj. Mi vidis multe da mizeruloj en la urbo kaj grupon da frenezaj "komunistoj" antaŭ la Lenin-muzeo, kiuj tenis la portreton de la terura fama Staline. "Komunistaj" virinoj kantis kaj viro alparolis la homamason.

Poste mi alveturis Arkhangelsk norde de Rusio, ĉe mia leteramikino. Dum 21 horoj, daŭre en dorm-vagono, mi veturis tra arbaregoj. Post Jaroslavo mi vidis riveregon "Volga", kies larĝo impresis min. En mia lando ne ekzistas tia rivero. Mi babiladis franclingve kun tri rusaj studentoj de Tambow. Ili regaligis min per teo kaj kukoj. Ili deĵoris kiel help-respondantojn en la litvagono dum la somerferioj. Ni parolis pri niaj landoj kaj pri la Fervojaj Kompanioj.

Bruno HENRY (57)

(sekvota)

=====

De la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo 1994 okazos la **43a Kultura Semajnfino** de la SARLANDA ESPERANTO-LIGO (SEL) en la "Kardinal-Wendel-Domo, en D-66424 Homburgo.

Krom la kutimaj praktikaj kursoj, specifa prelego ebligas al la "spertuloj" debati pri "asimilado de propraj nomoj - natura proceso en Esperanto", sub la gvidado de D-ro Josef KAVKA (el Ĉeĥio).

Bonvolu sendi plej rapide kiel eble la ĉi-suban aliĝilon al:

Sarländischer Esperanto-Bund e.V.

Querstraße 11
D-66287 QUIERSCHIED



ALIĜILO

al la 43a Kultura Semajnfino - 29/04|01/05 1994

NOMO

(validan bonvolu krucumi!)

ADRESO



Mi partoprenas kurson **a** **b1** **b2** **c** (seminario)

Mi deziras tranokti kaj matenmanĝi en la domo: 29/04 al 30/04

30/04 al 01/05

Mi partoprenos jenajn manĝojn: vespermanĝo vendrede vespermanĝo sabate

tagmanĝo sabate tagmanĝo dimanĉe

Mi mendas jenajn librojn: "Wir lernen esperanto" (kurso **a**, nur por germanlingvanoj)

"Vole... Novele" (kurso **b1**, por progresintoj, gv. Kr. BARKOVIĈ)

"Vortoj de Andreo Cseh" (kurso **b2**, por lingvaj spertuloj, gv.

gv. E. BORSBOOM)

Mi pagas samtempe la aliĝkotizon (30 DM) (20 DM por SEL-membro)

Dato:

Mi ne pagas aliĝkotizon (malpli ol 26 jaroj - student/ino)

Subskribo:

notende prenez note



pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



NE PROKRASTU
VIA(J)N ALIĜO(J)N!

➔ **nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**


STAGE D'ETE A VILLERS-lès-NANCY

Nous rappelons qu'un stage d'été avec 2 cours (pour débutants et perfectionnement) est prévu au Château de Rémicourt à Villers-lès-Nancy, **du 25 au 30 juillet inclus**. Au programme 4 à 5 leçons d'espéranto chaque jour en alternance avec des visites et excursions. Le programme détaillé est paru dans "**La Informilo**" 84. On peut le demander à
ESPERANTO - M.J.C. 27, Rue de la République, 54000 NANCY

(ou par téléphone au 83 27 95 55)

La cotisation prévue s'élève à 300F pour le stage et 960F pour la pension complète pendant les 6 jours. Ce stage ne fonctionnera que si 10 personnes au minimum s'inscrivent dans chaque cours.

partoprenu dum somere !!



SUR VIA NOT-LIBRETO... kelkaj interesoplenaj rendevuoj...

= 29a de aprilo / 01a de majo: **43a Kultura Semajnfino de S.E.L.**
Loko: Kardinal-Wendel-Haus, D-66424 HOMBURG/Saar
(aliĝilo ĉi-ene)

= 11/15ajn de majo: **86a Nacia Kongreso de U.F.E.**
Loko: AGDE (Langvedoko)
(detaloj en "La I^o" 84)

= 13/17ajn de majo: **Kongreso de Franca Katolika E^o-Asocio.**
Loko: MOULINS-lès-METZ
Respondecas: F-rino G. Preux, 55/3 Terrace, Rue du 11 novembre
59290 WASQUEHAL

= 16/23ajn de julio: **67a Kongreso de S.A.T.**
Loko: STRAŽNICE, Ĉeĥio.
Aliĝiloj: SAT, 67 Av. Gambetta, 75020 PARIS

= 25/30ajn de julio: **Somera E^o-Staĝo** (komencantoj kaj progresantoj)
Loko: Château de Rémicourt, 149 Rue de Vandoeuvre
54600 VILLERS-lès-NANCY
Aliĝilo en "La Informilo" 84

= 23/30ajn de julio: **Universala Kongreso de U.E.A.**
Loko: SEULO, Koreio
(denove dokumento pri UFE-karavanoj en ĉi-tiu n^o de "La I^o")

= 22/23ajn de oktobro: **38a Internacia Praktika Staĝo de Esperanto**
Loko: F-HAGUENAU
(Aliĝilo sendota siatempe al ĉiuj niaj abonantoj)

= PENTEKOSTO 94 (20/23 = 05) **ANTVERPEN, urbo de Eŭropa Kulturo, invitas vin!** (Pli ol riĉa programo...) Dok. ĉe: FRANDRA ESPERANTO LIGO, Frankrijkplei 140, B 2000 ANTWERPEN Belgio

Esperantistoj el Sankt-Peterburgo estas pretaj organizi por vi tutsemajnan aŭ 10-tagan restadon en tiu fama urbo de rusa tero, urbo de la caroj, de Petro la granda. La loĝado estas antaŭ-vidita en ne multe-kosta hotelo aŭ en familio de Esperantistoj. La programo konsistas el 1 aŭ 2 ekskursoj po-tage, jen kelkaj ekzemploj:

- 1) Rondveturado tra la urbo per aŭto.
- 2) Vizito de fama muzeo de Ermitaĵo
- 3) Muzeo kaj Isaaka katedralo.
- 4) Fortikaĵo Petro kaj Paŭlo
- 5) Rusa Muzeo, Kazana katedralo, Aleksandra Nevska Monaĥejo, Milit-mara muzeo, Zoo-muzeo.
- 6) Iom ekster la urbo eblas viziti eksterurbajn carajn palacojn en Puŝkino kaj Petergofo.
- 7) Aliaj famaj lokoj, preĝejoj, ktp.
- 8) Kromaj vizitoj laŭ deziro estas organizeblaj en aŭ ekster Sankt-Peterburgo.

Jen diversaj kostoj:

Tranoktado kun matenmanĝo	60 FF
Tagmanĝo+vespermanĝo po-tage	40 FF
Ekskurso kun enir-bileto	inter 30 ĝis 60 FF
Diversaj transportoj de kaj al aerhaveno	120 FF

Entute restado kaj ekskursoj dum unu semajno kostas proksimume 1200 FF

Por ekhavi la vizon al Rusio, necesas unue havi invitilon. Por ricevi la invitilon de la organizantoj, bonvolu komuniki viajn nomojn, adreson, profesion, laborlokon, naskiĝ-daton.

Kontakt-adresoj:

S-ino Liliĵa SERGEJEVA
Rusio 198020
SANKT-PETERBURGO
St. Petergofskij Pr. 21-183

S-ro André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
Francio

- Laŭ la ĉi-supraj kondiĉoj estas organizita de la 1a ĝis la 10a de majo 1994 Esperanto-kurso por lernantoj kaj instruistoj laŭ metodo CSEH kunlige kun turisma programo. Lerni kaj turismi en Sankt-Peterburgo.
- Interesaj periodoj: Junio kaj komence de julio kun "Blankaj Noktoj en Sankt-Peterburgo".
- Kompreneble dum aliaj periodoj ankaŭ eblas viziti Sankt-Peterburgon laŭ la supraj kondiĉoj.

Feriado en suda Pollando 1994

La Esperanto-Asocio en Kroscienko (en suda parto de Pollando preskaŭ ĉe la ĉeĥa limo) aranĝas Internacian Feriadon en Kroscienko de la 16-a ĝis la 30-a de julio 1994. Kompletan pensilon en luksa domo po-tage kostas ĉirkaŭ 12 dolarojn aŭ 72 FF. Kroscienko estas ĉarma urbeto ĉe la rivero Dujanec kaj ĉirkaŭita de belega montaro Pieniny.

En la programo estas proponita diversaj distraĵoj kaj ekskursoj:

Promenado per ĉevalĉaro tra la montara naturo.

Flosado tra breĉoj de Dujanec.

Vizito per aŭtobuso al Krakovo kaj Zakopane kun Esperanto-gvidanto.

Kaj krome: Fajro-vespero kun bakado de ŝafo, Balo kun dancoj, ktp.

La ekskursoj estos aparte pagendaj.

Informoj kaj aliĝoj ĉe: S-ino Majerczak St., ul. Kingi 6,
PL-34-450 Kroscienko n/D, Pollando, Tel. 48 187.2.3148

EUROPA ESPERANTO-FESTIVALO

Unika programo
antaŭ la Universala Kongreso

Organizanto:

Hungaria Esperanto-Asocio

H-1368 Budapeŝt, Pf. 193.

Tel.: (36-1)268-03-06 Fakso: 268-03-31



13a Internacia Literatura Forumo

Bratislavo - Slovakio

2 - 6 julio 1994

LA ESPERANTO - KABARETO

Organizanto:

Kooperativo de Literatura Foiro

Informoj:
 Esperanta PEN-Centro
 H-1581 Budapeŝt Pf. 117.



LUKSA esperantlingva prospekto pri Elzaco kaj pri tiea komforta kaj teknike ekipita staĝejo/restadejo en MITTELWIHR -ĉe la elzaca fama vinstrato- havebla kontraŭ 2 I.R.K°j (Francio: 3,70F en poŝtmarkoj)
ĉe: **ESPERANTO**, 26 Route de la Schlucht, **F-68140 STOSSWIHR**

Abonu utilan trimestran revuon "**LA DOMO**" por 120FF je la nomo de
TAKE-Esperanto RN 83 - Rue de Tiefenbach, F-68920 WINTZENHEIM

=====

...Vi vojaĝas tra Elzaco kun via familio... Abonantoj de TAKE-"LA DOMO" kaj iliaj gemikoj, tranoktu en la ĉi-supre aludita Centro, meze de mirinda vitejaro, tute proksime de **COLMAR!**

Petu la tarifojn, menciante TAKE-LA DOMO.

Lingvoj: franca, germana, angla... + baldaŭ esperanto, se abundas la petoj!

Akcepteblecoj de la kunvenejo

51 komfortaj ĉambroj kun duŝejo,
necesejo kaj lifto.

26 ĉambroj kun tualetejo

6 kvinlitaj dormejoj

2 manĝosalonoj (50 - 180 lokoj)

7 laborĉambroj (15 - 180 lokoj)

Por atingi Mittelwihr :



Fervoja stacidomo de Colmar,
buslinio aŭ taksio



Nacia Strato 83 ekde Strasburgo aŭ
Colmar, poste al Ribeauvillé aŭ
Riquewihr



Flughaveno de Bâle-Mulhouse aŭ
Strasbourg-Entzheim

Informoj ĉe :

Centre de Mittelwihr
16, rue du Bouxhof
68380 - MITTELWIHR
Tél. 89 47 93 09
Fax 89 49 02 25

UNE "GRIFFE" DE QUALITE POUR VOTRE VOITURE!!!

(ou votre valise, votre porte-document, votre guitare, votre "tout-ce-que-vous-pouvez-imaginer-de-rigide-de-lisse-de-dur"..)

couleur: vert sauf
le premier **E** et le **a**
qui sont rouges

Esperanto



Réalisée par un professionnel de la "PUB", sympathisant de l'Espéranto, cette "griffe" qui se pose à la manière d'un auto-collant, mais ne se retire plus ensuite est de couleur verte, les lettres **E** et **a** étant en rouge pour des raisons d'esthétique.

Conçue à l'origine pour personnaliser la carrosserie de votre voiture, comme le font couramment les grandes marques à l'occasion du lancement de certaines séries "limitées" -la 205 "Junior" ou "STEFIE" ou "LACOSTE", la Panda "ESTIVALE", l'Opel Corsa "VIVA", etc.- la griffe "ESPERANTO" officialise encore plus la pénétration de notre langue dans la vie de tous les jours, au côté des "grands"...

Pour les espérantistes, le fabricant -c'est un ami- consent exceptionnellement à me fournir au prix coûtant (soit environ 150F) la série de **quatre** transferts identiques -cela correspond en fait à **4** transferts pour le **prix d'un!**-... Les connaisseurs sauront apprécier...

Si vous êtes intéressé (déjà plusieurs précommandes), contactez moi:

J.F. COUSINEAU, 268 Route de Bellet, 06200 NICE

Kiel kutime, la printempa duobla numero de "HEROLDO DE ESPERANTO" enhavas liston de feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto.

La listo por 1994, en kiu aperas datoj, adresoj kaj programoj, pri skribas ĉirkaŭ 250 aranĝoj en la tuta mondo.

Oni povas senpage ricevi la koncernan duoblan numeron, marpoŝte se ekstereŭrope, petante ĝin ĉe la redakcio (Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (Torino), Italio). Kiel konate, Heroldo de Esperanto", fondita en 1920, estas eldonata de laŭleĝe registrita societo sen profita celo.

POLA RADIO

Jubilea konkurso

Lige kun la 35-jara Jubileo (la 4-an de aprilo 1994), la Esperanto-Redakcio de Pola Radio organizas specialan konkurson. Oni invitas al la partopreno ĉiujn aŭskultantojn, legantojn de Esperanto-gazetoj, membrojn de Esperanto-kluboj en diversaj landoj. Por partopreni la konkurson, oni devas respondi **almenaŭ al unu el la demandoj:**

1. Kio instigas vin aŭskulti la Esperanto-elsendojn de Pola Radio kaj kian signifon ili havas por vi?

2. Kion vi opinias pri la rolo kaj signifo de la Esperanto-elsendoj de Varsovio en la tempo de grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj strebado al partnereca-paca kunlaboro sur nia kontinento?

3. Kigrade la Esperanto-elsendoj de Pola Radio - fone de viaj nacilingvaj amas-komunikiloj - proksimigas al vi la bildon de Pollando?

La amplekso de la respondoj estas laŭvola. La konkursojn oni sendu ĝis la 30-a de junio 1994 al la kutima **adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.K. 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.**

Inter la aŭtoroj de plej interesaj konkursaĵoj oni lotumos specialan premion en la formo de fasko da magnetofonaj kasedoj kun kopioj de elektitaj intervjuoj kaj literaturaĵoj el la arkivo de la Redakcio. Krome estos lotumitaj Esperanto-libroj, -muzikkasedoj, popol-artaĵoj k.s.

Kaj jen la ondolongoj (laŭ MET): je la 15h30 - 25,39 m, 31,45 m, 31,50 m, 41,99 m kaj 48,90 m (resp. kHz: 11815, 9540, 9525, 7145 kaj 6135); je la 22h30 - 48,90 m, 50,04 m, 200 m (resp. kHz 6135, 5995, 1503).

Pli da leteroj ol ĉe la angla redakcio!

La dissendoj por eksterlando de la Pola Radio okazas en diversaj lingvoj, sed la duan lokon, laŭ nombro de ricevitaj leteroj okupas la Esperanta Redakcio. En 1993 ĝi ricevis 2252 leterojn, preskaŭ duoble pli ol la angla fako, al kiu alvenis 1220 skribaĵoj de aŭskultantoj; la unuan lokon daŭre gardas la germanlingvaj elsendoj (2910 leteroj).

Krom la Poloj, plej multe skribis la Germanoj (592), la Finnoj (483), la Nederlandanoj (203), la Svedoj (154), la Ĉeĥoj (141), la Francoj (121), la Aŭstroj (74), la Estonoj (65), la Italoj (60) kaj la Litovoj (51).

En januaro ĉijara la Esperanto-disaŭdigoj transiris al la unua loko: 355 korespon-

dadoj, kontraŭ 283 por la germanaj programoj kaj 130 por la anglaj.

La Esperanto-Redakcio de la Pola Radio (pk 46, PL-00-950 Warszawa) eldonas senpagan monatan bultenon. La programoj okazas ĉiutage, la **koncernajn horojn kaj la ondolongojn rigardu en "Konkurso"** (en tiuĉi numero). Koncerne la radio-dissendojn en la internacia lingvo, estus oportune, ke UEA reeldonu (ĝisdatigite) la dokumenton jam de longe elĉerpitan "Esperanto kaj radio" de H. Tonkin.

Kiel fondi radio-elsendon

Konsilio, kiel fondi Esperanto-elsendon en loka radio, baldaŭ aperos en broŝuro verkita de **Andreo Pettyn**. La verko estas rezulto de enketo de la aŭtoro ĉe ĉiuj radiostacioj utiligantaj la internacian lingvon.

A. Fighiera-Sikorska,
redaktorino

Antaŭ 35 jaroj: Radio Varsovio

"Por ke la lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin **tia**". Per la supraj vortoj, Zamenhof substrekis la fakton, ke Esperanto akiras lingvan civitanecon nur kiam ĝi eniros la tutmondan praktikan uzadon, skribe kaj voĉe, por ĉiaj celoj. Nome, kiam ĝi ne plu estos gramatika projekto, sed fariĝos vivanta instrumento de internacia komunikado.

Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto plenumas tiun ĉi rolon, ĉiuazimute. Skribe, ĝia utiligado enradikiĝis en dinamika beletro, kiu de tempo al tempo naskas ĉef-verkojn. Voĉe, ĝia aplikado plej brile esprimiĝas en la radio-dissendoj, kiuj de 1922 disaŭdigas la internacian lingvon tra la etero, translimen.

Ne eblas paroli pri Esperanto-dissendoj sen halti antaŭ la nomo de Radio Varsovio, kies programoj en Esperanto ĉijare festas sian 35-jaran datrevenon. Kvankam la Esperantlingvaj programoj de Radio Varsovio ne estas la unuaj tiuspecaj en la mondo, ili akiris rekordajn primatojn, kiel la plej longjaraj, la plej oftaj, la plej popularaj kaj la plej aŭskultataj en la universo de la internacia lingvo. Mi aldonus unu plian rekordon, t.e. la profesiecon de la informaj, kulturaj, movadaj kaj muzikaj programoj.

Ĉiu el la menciitaj rekordoj meritis detalan pritrakton, sed mi limiĝu al du: la ofteco kaj la populareco. Rilate al la ofteco, sufiĉas atentigi, ke Radio Varsovio dum longa periodo dissendis en Esperanto eĉ 6-foje tage! Pri la populareco atestas la pli ol 2000 leteroj, kiujn la redakcio ĉiujare ricevas el la tuta mondo. Senprecedenca fakto: al la Esperanta redakcio alvenas preskaŭ duoble pli da leteroj ol al la angla!

Kontribuo de la Varsoviaj dissendoj al la formiĝo, maturo kaj disvastiĝo de la Esperanta kulturo atingis historiajn dimensiojn, kiujn eĉ ne necesas ĉi tie akcenti.

Oportunas, male, rememori en historia perspektivo tiun nebulan, grizan posttagmezon en 1959, la jaron de la Jubilea Kongreso, kiam por la inaŭgura elsendo la 4-an de aprilo renkontiĝis en la Varsovia studio kelkaj parolantoj, inter kiuj la nepo de Zamenhof, Ludoviko, Andreo Rajski kaj la subskribinto. Inter la redaktoroj troviĝis Ada Sikorska kaj Jurek Uŝpieński kaj kelkaj (profesiaj) paroladistoj. La famiĝonta Andreo Pettyn, "la dolĉa voĉo" kiel dirus Kálmán, aliĝis al la redakcia stabo kelkajn monatojn poste.

Pasis 35 jaroj, forpasis pluraj redaktoroj, aliaj foriris, novaj envenis: ni danku ĉiujn enpense, ĉar laŭnome citi ilin ne eblas. Pasis reĝimoj, sed la Esperanto-elsendoj de Radio Varsovio restis. Kaj plue restos, ĝis kiam vi skribos al ĝi leterojn.

Gian Carlo Fighiera

POUR UN ESPERANTISTE
LA "JOURNEE DU LIVRE"
DURE TOUTE L'ANNEE!

el nia libro-servo
de notre "livre-service"

La libro-servo de "ILTIS-Eldonejo" (Postfach 1530, D-66365 St-INGBERT) ĵus anoncis aperon de kvar novaj titoloj. Nia propra libro-servo evidente peras por havigi al vi la menciitajn verkojn kaj ĝenerale la eldonaĵojn kuŝantajn en la katalogo de ILTIS-E°.

- o E.T.A. Hoffmann: **Fraŭlino de Scuderi. Rakonto el la epoko de Luizo Dek-kvara.** El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis 1992. 76 p. (Iltis-Serioj. II. Beletro tradukita. 6.) ISBN 3-927613-24-X Prezo: ĉirk. 44FF
- o **Germanaj klasikaj noveloj:** La krimulo pro honoro perdita (Friedrich von Schiller). Novelo (Johann Wolfgang von Goethe). La fago de la judoj (Annette von Droste-Hülshoff). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis 1992. 116 p. (Iltis-Serioj. II. Beletro tradukita. 7.) ISBN 3-927613-25-8 Prezo: ĉirk. 80FF
- o **Georgo Kamaĉo: La Majstro kaj Martinelli.** Saarbrücken: Iltis 1993. 28 p. (Iltis-Serioj. I. Beletro originala. 10.) ISBN 3-927613-30-4 Prezo: ĉirk. 25FF
- o **Jean Ribillard: Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud.** Kun antaŭletero de Raymond Fiquet. (Represo de la eld. La Laguna 1963.) Saarbrücken: Iltis 1994. 152 p. (Iltis-Serioj. I. Beletro originala. 8.) ISBN 3-927613-21-5 Prezo: ĉirk. 50FF

La unuaj du estas (kun la escepto de Goethe) klasikaj krim-rakontoj flue legeblaj ankaŭ dank al la elstara traduko de Reinhard Haupenthal.

La tria estas unu el la plej superbaj satiroj originale verkitaj en nia lingvo. Gi pikas en la vanton de Valerio Ari kiu nomadas sin Giorgio Silber.

La lasta estas represo de klasika rakonto originale verkita kaj furorinta en la sesdekaj jaroj.

"Adieu Meuse endormeuse..."☆

Kelkaj el niaj legantoj tikletis sian muzon responde al nia propono traduki strofon de Ch. PEGUY, "Les adieux de Jeanne" ("La Informilo" 84).

Jen iliaj kontribuoj...

*"Adiaŭ, milda Moz', l'infano memoras.
Vi restas en herboj, silente fluanta
Moz', jam komenciĝis elirado mia
Al novegaj landoj, kie vi ne fluas".*

Ginette MARTIN
688290 SAULXURES-sur-MOSELLOTTE

*Adiaŭ Mozo endormiga
Kaj dolĉ' al mia infaneco.
Vi loĝas ĉe l'herbejoj,
Kie vi plej malsupren fluas...
Mozo adiaŭ... Jam ekis mia foriro
Al novaj landoj, en kiuj vi ne fluas.*

*Adiaŭ Mozo endormiga
Kaj dolĉ' al mia infaneco.
Vi loĝas ĉe l'herbejoj,
Kie vi plej malsupren fluas.
Mozo adiaŭ!... Jam ekis mia foriro
Al novaj landoj, en kiuj vi ne fluas.*

Lucien HODAPP
68210 CHAVANNES-sur-l'ETANG

*Adiaŭ Moz' lulpoza kviet' de l'infan-aĝo
Ci restas ĉe herbejoj kun cia flustra flu'
Ho Moz' adiaŭ... Ekis por mi la forvojaĝo
Al fremdaj landoj kie ci fluas jam ne plu.*

Simone BONIOL
75012 PARIS

(S. Boniol riĉigas ofte la nacian bultenon de UFE per noveloj interesoplenaj teme kaj stile.)

Gratulojn al ĉiuj!

=====



en nia leter-kesto dans notre courrier



al FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO
marto 1994

ESPERIGU 200 ESPERANTO-INSTRUISTOJN

UNIVERSALA KULTURA SERVO
Logement n° 387
Cité Analamahitsy
MG-101 Antananarivo
Respubliko de Malagasio

Kiel Malagasio, la Esperanto-agadoj de UNIVERSALA KULTURA SERVO pro sen tantom estas malkonataj aŭ ĝuste nekonataj eksterlande. Pro la alta kosto de la afrankoj bedaŭrinde s.ro Eugène Raveloson ne plu povas kiel kunlaboranto de la sendependa magazino "MONATO" kontribue sendi artikolojn por plej bone konigi Malagasion. Dum dek jaroj UNIVERSALA KULTURA SERVO (UKS) senbrue kaj proprarimede strebadis disvastigadi Esperanton tra la insulo. Jen ĝi sukcesis en tiaj lokoj, jen ĝi malsukcesis en aliaj. Nenio estas perfekta sur tero ! La rimedoj konsistis el simplaj kontribuajoj de la kursanoj kaj el propra mono de s.ro Eugène Raveloson kiu dediĉis rinarkindan parton de siaj monataj salajroj. Estas domaĝe, ke li ne plu povas movi tiudirekten K I A L ? Vi eble demandas vin !

La Malagasioj ekde 1981 trapasas malfacilan vivkondiĉon pro multfojaj devalutoj de la malagasa franko. La inflacio memkompreneble kondukas al senigo de la aĉetpovo. En silento kaj mizero dum 10 jaroj, la malagasa popolo vivis. En 1991, ĝuste la 10an de junio, la toleremo eksplodis kaj iĝis kolero kiu renversis la reĝimon. Tio bedaŭrinde ne stopas la fosajon sed pli enprofondigas ĝin. Aliflanke la du ciklonoj DAISY kaj GERALDA RESPEKTIVE en januaro kaj februaro de ĉi-jaro pli akriĝas la situacion pro la detruo kiu ruinis 90 % de Malagasio. Rizejoj estas inunditaj kaj bazan nutraĵon ne havas la malagasioj ĝis netaksebla periodo, eble unu aŭ du jarojn.

Konsenkvence, UNIVERSALA KULTURA SERVO (UKS), s.ro Eugène Raveloson, la kursanoj sekvas tiun fluon de la vivo kaj renkontas la malfacilaĵojn neniam konitajn en la lasta duonjarcento. La kursanoj ne plu havas la eblon kontribui ĉar por mezaj laboristoj iliaj monataj salajroj apenaŭ ebligas al ili vivi unusemajne.

Je tio UNIVERSALA KULTURA SERVO DECIDAS organizi ŝenpagan instruadon de Esperanto al 200 personoj. Kial la nombro estas antaŭfiksita ? Laŭ la nova disdivido ekonomie, socie kaj kulture, en dudeko da memstaraj regionoj (departementoj) minimume deko da Esperanto-instruistoj el profesiuloj (pedagogoj), devos pli poste transpreni la gvidadon de la instruado, la disvastigado kaj la organizadon de efikaj kluboj grupoj ... KREDU, ke direkti ĉion el Antananarivo pro la apartiganta distanco malhelpas.

Por realigi tiun novan strategian agadplanon, UNIVERSALA KULTURA SERVO, s.ro Eugène Raveloson ne-indulgitaj de la krizo starigas fondumon nomitan : "200 ESPERANTO-INSTRUISTOJ". Tiu celo estus neniel atingota se la adekvataj rimedoj mankus. Ni estas tutcertaj, ke vi sendube iel kontribue subtenos ĝin.

Sendu viajn kontribuajojn al ĉi-supra adreso de UKS.

Kun anticipaj dankoj, ia reago viaflanke estas esperata !

Korajn salutojn al vi !


Eugène RAVELOSON

Niaj legantoj eksciis pri la helpo, kiun nia federacio decidis alporti al la dinamika malagasia "Universala Kultura Servo"... Jen respondo, rekte el la granda insulo, kiu atingis nian kasiston:

UNIVERSALA KULTURA SERVO
Logement n° 387
Cité Analamahitsy
MG-101 Antananarivo
Respubliko de Malagasio


11.01.1994

al ORIENT-FRANCA ESPERANTO FEDERACIO
MJC Philippe DESFORGE
27, rue de la République
FR. 54000 - NANCY (Francio)

UNIVERSALA KULTURA SERVO prezentas al la Orient-Franca Esperanto-Federacio siajn multajn dankojn pro la donaco kiu ebligis :

- al Esperanto-Kursanoj ricevi lernolibrojn "Manuel de Perfectionnement kaj Lexique Fondamental Esperanto-Franca"
- al UKS akiri du stampilojn je la nova adreso.

UNIVERSALA KULTURA SERVO esperas, ke vi bonvole plu subtenos niajn agadojn, kiuj pli kaj pli malfaciliĝas pro la vivkondiĉo de la malagasia popolo.


Eugène Raveloson

PETO AL SKRIBEMULOJ...

Se vi bone skribas en Esperanto, vi sciu -kaj vi sciigu al bonaj esperantistoj aŭ korespondantoj- ke la **Japana Radio NHK** intencas plivastigi sian areon de aŭdebleco al Eŭropo. Ni povas pensi, ke tre malmultaj homoj emas skribi por pledi por siaj naciaj lingvoj (tion konfirmas parte la leteroj ricevitaj ekzemple de Pola Radio). Amaso da **petoj por programoj en Esperanto** instigus NHK-on uzi lingvon, per kiu **tuta Eŭropo** estus atingebla. Ni povas supozi, ke NHK antaŭvidas pli efikan persatelitan dissendon de siaj programoj, kio igus la aŭskultadon treege bonkvalita.

Al via skribilo!...

NHK-Tokyo
Ekstera Servo
TOKYO 150 01
Japanio / Japon



=====

FINIĜIS LA ABONPERIODO 1993 !!

Finiĝis la abonperiodo por la jaro 1993. Tiu-ĉi numero 85 estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj aboninto. La venontan numero 86 jam ricevos nur tiuj, kiuj renovigis sian abonon por 1994. Se sur la adres-etikedo de via **Informilo**, troviĝas la mesaĝo Lasta Numero !!, tiam bonvolu senprokraste pagi vian abonon laŭ la ĉi-suba tarifo.

La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abono-jaro, pago *A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp*, kaj eventuale abono-jaro 95 kaj pago.

	Jaroj:	1994	1995	1996
Abono al La Informilo por enlandaj adresoj		50 FF	50 FF	50 FF
Abono al La Informilo por eksterlando			20 Rpk aŭ	74 FF
Federacia kotizo		27 FF	28 FF	29 FF
Bankkostoj, por pagoj per eksterlanda bankĉeko			20 FF	

Bonvolu ĝiri la koncernan sumon al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:

FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PÊK 1997 72W NANCY

Aŭ rekte per bankĉeko al mia adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

**NI ESPERANTIGU PRODUKTOJN!
LA PRODUKTOJ ESPERANTIGU LA HOMOJN!**

En tiu-ĉi numero de "LA INFORMILO" vi malkovras la unuan tutpaĝan reklamon dulingvan (Esperanto-franca lingvo) pri produkto prizorgata de **TAKE-esperanto**. Aliaj produktoj estos prezentataj pere de ESPERANTO en la estontaj monatoj.

Tiajn produktojn vi ja tutmaniere aĉetos por via ĉiutaga vivo, aŭ por specialaj festoj. Kial ne aĉeti ĝuste tiujn produktojn por vi aŭ donace por viaj geamikoj... Cetere viaj geamikoj aŭ gekonatoj certe ankaŭ pretus helpi al Esperanto per aĉeto de tiuj produktoj. Vi informu ilin!

Ne hezitu reklami! Ni proponas nur **kvalitajn produktojn!** Esperanto estas valora varo! Ĝi promociu valorajn varojn!

La Colmara skipo de **TAKE - LA DOMO**

=====

ECONOMIE

L'espéranto, langue des affaires...

● ● ● *Développer le commerce international grâce à l'espéranto: les animateurs du réseau international TAKE(*), créé à l'initiative d'un chef d'entreprise du bâtiment, y croient dur comme pierre.*

Permettre aux entreprises de compléter leur stratégie à l'international grâce à l'espéranto: la démarche n'a rien d'utopique. Un enseignant de Stosswihir, Edmond Ludwig, et un ancien directeur régional du commerce et de l'artisanat, Jean-Pierre Cancel, lui ont apporté leur caution. Le premier par sa maîtrise de l'espéranto; le second par ses compétences en économie et en marketing.

«Avec l'espéranto, on peut rentrer dans n'importe quel pays sans obstacle linguistique», s'enthousiasme Jean-Pierre Cancel Lui qui ne possédait que quelques rudiments de cette langue, se targue d'avoir été capable, au bout de 15 jours, d'envoyer des fax très techniques aux quatre coins du monde. «Ce

que je n'aurais pas pu faire en chinois».

Edmond Ludwig fait valoir l'argument géopolitique. «Depuis l'ouverture à l'Est, les gens de là-bas se servent de l'espéranto pour faire du commerce».

Un service marketing

Avec la stratégie de TAKE, la langue vecteur de fraternité universelle prend une dimension économique. L'association a été créée en juin 1993, après une très sérieuse «étude de marché» menée auprès des structures espérantistes de 43 pays.

Au départ, elle jette un pont entre les professionnels de la construction espérantistes. Aujourd'hui, le réseau dépasse largement ce cadre. Il édite

une revue «La Domo» consacrée à tout ce qui touche l'habitation et tirée à 800 exemplaires. Il propose un service conseil-marketing, de mise en relation sur le marché et de traduction. Et dispose même d'un stand pour les salons professionnels. Les adhérents de Take —une centaine pour l'instant— sont aussi ses clients.

Un viticulteur fait sa pub

Michel Basso, le jeune industriel du BTP espérantiste à l'origine de sa création, récolte les fruits de son engagement. L'espéranto lui a permis de trouver un fournisseur polonais dans le bâtiment. «Deux camions de ferronnerie ont été livrés à l'entreprise de

Wintzenheim. Transport plus rapide pour un produit moins cher et de bonne qualité», diagnostique Jean-Pierre Cancel.

L'association a convaincu un viticulteur alsacien de faire sa publicité dans la presse espérantiste. «Ce qui lui ouvre un marché potentiel de 30000 consommateurs rien qu'en France» Il rejoint ainsi deux autres entreprises françaises viticoles, et la CCI de la Meuse qui utilisent l'esperanto à des fins commerciales Des pionnières!

Mais avec plusieurs millions d'espérantophones dans le monde, les débouchés sont plutôt prometteurs I. N.

(*L'association TAKE (rien à voir avec l'anglais) est basée rue de Tiefenbach, 68920 Wintzenheim. Tél. 89 79 79 92.



TAKE - Servoj

•••••

Première en Elzaco !

Première en Alsace !

Première en la mondo de komerco !

Première dans le monde du commerce !

•••••

Tri ALZACAJ VINOJ selektitaj kaj etikeditaj en ESPERANTO.

Trois VINS d'Alsace sélectionnés et étiquetés en ESPERANTO.

(laŭ konsiloj de TAKE Esperanto-Servoj)



Philippe GOCKER, vinkulturisto kaj diplomita enologo

Philippe GOCKER, Viticulteur et oenologue diplômé

proponas al vi 3 famajn vinojn.

vous propose 3 vins renommés.

SYLVANER 1992 23 F

RIESLING 1992 30 F

Ora medalo / Médaille d'or de Colmar

GEWURZTRAMINER 1992 33 F

Ora medalo / Médaille d'or de Colmar

TRADICIO..... KOMPETENTO.....KVALITO.....

Tradition.....Compétence..... Qualité.....

De 1568 la familio GOCKER pasie prizorgas siajn vitojn (7 hektaroj) kaj amece bredas siajn vinojn...

Depuis 1568 la famille GOCKER soigne avec passion ses vignes (7 hectares) et élève ses vins avec amour...

Vizito komentata de la vinkelo, vendado surloka kaj laŭ mendoj.

Visite de cave commentée, vente sur place ou sur commande.

PHILIPPE GOCKER

24, rue de Riquewihr

68630 MITTELWIHR

Tel: 89.77.52.56 Fakso: 89.79.79.93



JES, mi mendas botelojn de ALZACA VINO kun Esperanto-etikedo.*
*OUI, je commande bouteilles de vin d'Alsace étiquetées en Esperanto. **

..... botelojn/ bouteilles de SYLVANER 1992 je 23 FF
 botelojn/ bouteilles de RIESLING 1992 je 30 FF
 botelojn/ bouteilles de GEWURZTRAMINER 1992 je 33 FF



Ĉi-kune ĉeko de FF / *Ci-joint chèque de FF*

Liverota adreso *adresse de livraison:*

NOMO/ Nom:

Adreso:

.....

Resendu la slipon kun ĉeko al

PHILIPPE GOCKER

24, rue de Riquewihr

68630 MITTELWIHR

Tel: 89.77.52.56

Fakso: 89.79.79.93

Dato:

Subskribo/ *signature:*

* Prezoj kun afranko kaj AVI entenataj por minimuma mendo de 24 sortimentitaj boteloj.

* *Franco de port et TTC pour livraison minimale de 24 bouteilles assorties.*

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1993:

Donacoj por la Federacio: S-ro Bertrand DENIS 29 F
S-ino Marie-Claude JEANMAIRE 29 F F-ino Anna JACQUOT 29 F
F-ino Nicole ROMAIN 175 F
Sume 297 FF

Donacoj por La Informilo: S-ro André BLANCHET 29 F
S-ino Carmen FLEISCHER 29 F F-ino Nicole ROMAIN 175 F
Sume 233 FF

FINANĈA RAPORTO ORIENTA FEDERACIO 1993

dato 16.02.1994

ENSPEZOJ FEDERACIO

ELSPEZOJ FEDERACIO

104 Federaciaj membroj	2704.00
51 UFE-membroj kun pago	1088.00
5 Donacoj al Federacio	297.00
8 Perado kotizoj abono	1275.00
1 Rentumo kaj sikavoj	1518.50
6 Vendo de materialo	619.00
3 Profito staĝoj	1783.50

	9285.00

16 Sekretariaĵoj	1589.20
3 Perado de kotizoj	1155.00
2 Esperanto-Budo	2644.07
1 Telefon-respondilo	890.00
1 Aĉeto de sikavoj	12281.15
3 "Lettre de l'Esp"	1155.50
6 Aĉeto de materialo	490.00
2 Perado de abonoj	120.00
1 Premio al lernanto	245.00
4 Donaco UKS Madagask.	679.59
1 Diversaĵoj	100.00

	21349.51

ENSPEZOJ "INFORMILO"

ELSPEZOJ "INFORMILO"

249 Abonoj al Informilo	11456.00
3 Donacoj al Informilo	233.00

	11689.00

2 Eldono Inf.81 400 ek	1414.00
2 Eldono Inf.82 350 ek	1855.00
2 Eldono Inf.83 370 ek	1971.90
3 Eldono Inf.84 375 ek	2298.00
4 Enlanda sendado Inf.	429.40
4 Eksterland.sendkosto	826.00
2 Afranko + telefono	116.00
18 Materialo por Inf.	1110.12
1 Bank-kostoj ĉeko	40.00

	10060.42

ENSPEZOJ FEDERACIO	9285.00
ELSPEZOJ FEDERACIO	21349.51

PROFITO FEDERACIO	-12064.51

ENSPEZOJ "INFORMILO"	11689.00
ELSPEZOJ "INFORMILO"	10060.42

PROFITO "INFORMILO"	1628.58

Havo je la 31 12 92	18122.50
PROFITO FEDERACIO	-12064.51
PROFITO "INFORMILO"	1628.58

Havo je la 31 12 93	7686.57

La trezoristo :
A. Grossmann

En 1993 nia federacio sukcesis financi Esperanto-budon kunlabore kun TAKE, kiu ĝin elpensis kaj realigis. Krome ni akiris telefon-respondilon kaj daŭre propagandis per dissendado de "Lettre de l'espéranto". Nia membraro preskaŭ atingis la nombron 250. Nia bona financa situacio donas al ni la eblecon fari pliajn investadojn kaj ampleksigi nian propagandadon.



? u distra angelo



KRUCVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

1 Pruvantoj dokumentoj. 2 sufikso - muzikinstrumento(R) - komence de endemio. 3 Prostituejo(R) - korpoparto(R). 4 Prepozicio - loĝejo - birdkapo - atomnumero 90(R). 5 Filozofia doktrino. 6 Numeralo - daŭre pruvas sian ĉagnenon. 7 Nedifina pronomo - sufikso - ŝtonego - agrabla hobia(R). 8 Kolektohobia. 9 En la centro de Milano - tuto - sufikso. 10 Havanta romaneskan sentemon - artikolo. 11 Demanda adverbo - partoj de presmaŝinoj. 12 Verba finaĵo - kirurgia sufikso(Fon.) - atomnumero 54.

VERTIKALE

3 Muzikinstrumento(R) - pronomo - fungo(R). 4 Poemo - baldaŭna printempo. 5 Falfolia arbo - alfo. 6 Norda domo - laŭregula stato - aŭstralia lacerto(Fon.). 7 Eseo, disertacio - parto de doktrino de nekredantoj - verba finaĵo. 8 Sufikso - interkrucigante. 9 centono de monunuo - sufikso - ligna kuvo(R). 10 Substantiva sufikso - haŭto - fendo - membro. 11 Tio impresas la flarsenton(R) - preno de io provizore kontraŭ pago - prepozicio - sufikso. 12 Adverbo - nedifina pronomo - poemoj - iom da jogurto.

SILABENIGMO

Helpe de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj silaboj, malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

an an do ek eto ge glo gve id in in io it ka kan kru ku la le len ma mo ni ni no no ov
pin re ri ro si so so sta to to to to to to tuo ur

1	+ - - + - -	legomo
2	+ - - + - - -	tutaĵo de irotaj vojoj
3	+ - - +	plandmarŝa mamulo
4	+ - - + - - -	"juna" soldato
5	+ - - + - -	aŭtoro de l' "Metamorfozoj"
6	+ - - + - - - -	flegi ungojn
7	+ - - + - - - -	mara birdo antarkta
8	+ - - + -	tuja senpera ekkonsciado
9	+ - - + -	litergrupo mallongiga
10	+ - - + - - -	specio de krizantemo
11	+ - - + - - - -	humura kurta rakonto
12	+ - - + - -	glaciaĵo aŭ ĝelo
13	+ - - + -	ĝi devias lumradiojn
14	+ - - + - - - -	malvorto
15	+ - - + -	atomnumero 50

charade à tiroirs

Mon premier est lu
Mon deuxième n'a pas d'enfants
Mon troisième est pensif
Mon quatrième est en colère
Mon cinquième a besoin d'un
vétérinaire d'urgence
Vous tenez mon tout dans
vos mains

Pri alia ŝarado...

Stefano rehejmiĝas post la lernotempo kaj alparolas sian patron:

"Nu, Paĉjo... Ci ŝatas ŝaradojn... Mi vetas, ke ci malfacile solvos ĉi-tiun..."

"Mia 1a surhavas okulvitrojn, mia 2a havas longajn harojn, mia 3a ŝatas naĝi, mia 4a ofte silentas, mia 5a...". Paĉjo malpacientiĝas! "Rapidu, rapidu... kaj la lasta? - La lasta? Estas mi... Nur 2 poentojn mi ricevis en matematiko..."

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ = **krucvorttenigmo**: "ora sloŝilo ĉion malfermas"

silabenigmo: "vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu"

S-ino MARTIN, S-roj CUENOT kaj ROUX premiĝis je nia jarfina "konkurso". Ili ricevos libron el nia federacia libro-servo.